
# AMERIKA ESPERANTISTO




MARCH, 1912

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO
# AMERICAN ESPERANTIST

Entered as second-class matter January 11, 1911, at the Postoffice at Washington, D. C., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by the*

**AMERICAN ESPERANTIST COMPANY**
**607 Fifteenth Street, N. W.**
**Washington, D. C.**

**TEN CENTS A COPY** **ONE DOLLAR A YEAR**

**Eksterlande $1.25 (Sm. 2.50)**


All persons interested may obtain, free of charge, any possible information regarding Esperanto—location of nearest society, class or recommended teacher, text-books, correspondence instruction, etc.—by sending name, address, and stamp for reply to the above named Company, or to THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, at "The Esperanto Office," Washington, D. C.



# The American Esperanto Book

**PRONUNCIATION—**

Clearly explained, with keys and exercises. No teacher needed.

**GRAMMAR—**

The original international rules, with translation; a careful analysis from the viewpoint of the person of moderate education.



**EXERCISES—**

Forty-two standard international exercises, by Dr. Zamenhof, author of Esperanto; each has vocabulary notes and translation.

**VOCABULARIES—**

Esperanto-English, complete, 76 pages; English-Esperanto, selected, 54 pages.

Standard Edition, cloth bound, postpaid for $1.00

With *new* subscription to **Amerika Esperantisto** . . . . . . . . . . **$1.50**

TO Esperanto Clubs, and to responsible persons wishing to form clubs, we supply quantities of the American Esperanto Book, with magazine Subscription Cards, *on account*, to be paid for as sold. Nine-tenths of the Esperanto clubs in America use this book, and find it convenient to keep a supply on hand without investment. Unsold copies are always returnable.

**AMERICAN ESPERANTIST COMPANY**
607 FIFTEENTH STREET, N. W.
WASHINGTON .·. .·. .·. D. C.


Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

Vol. 11 MARCH, 1912 No. 2

## Your Campaign

THE special publicity campaign now being carried on by means of the "letter to editors" is bringing forth excellent results. The proposition was first laid before you in the January number of AMERIKA ESPERANTISTO. Two weeks later, when preparing copy for the February issue, we were beginning to see the results, and a total of twenty requests a day for the "Glimpse of Esperanto" was announced with considerable gratification. The day that issue came from the press, the mail brought fifty-three inquiries,—directly on account of published copies of the letter to editors. As the present "copy" is being written, the daily average of inquiries varies from seventy to eighty! Probably before these same words are read by you there will arrive more than one hundred a day. *Think of it!* Over *three thousand* more persons *each month* will then at least be learning for themselves what Esperanto really is, even if their interest should go no further!!!

It looks as though we should soon be able to distribute to inquirers a large portion of the million copies of the "Glimpse," and we will manage somehow to keep the copies printed and the postage paid, if YOU will see to it that the inquiries come. If you have not yet supplied every paper in your city, the papers of surroundings cities, and the magazines to which you are a subscriber, write to THE ESPERANTO OFFICE *at once*, asking for two, three, ten, twenty, copies of the "letter to editors." These are neatly typewritten and signed by the secretary of the Association; and you are to send one to every paper or magazine you can, with a personal letter requesting the editor to publish it. This nearly always ensures publication, and in several cases the editors have also published a favorable editorial article.

This is YOUR CAMPAIGN. What are *you* doing about it in *your* section of the country?

## La Montamara Festo

Ni petas ke la ESPERANTISTA GAZETARO bonvole represu la ĉefajn faktojn el ĉi tiu artikolo, kaj ankaû ni petas, ke la esperantistoj faru nacilingvan tradukon por enpresigi en siaj naciaj jurnaloj, kaj nepre sendu exzemplerojn al la "Commercial Club, Tacoma, Washington, Usono;" kaj ke ili afable sendu gratulan poŝtkarton al la "Montamara Festo-Asocio," ĉe la sama adreso. Tio multege helpos al la propagando de Esperanto ĉe ni.

Kun granda plezuro ni informas la esperantistaron pri progresema ago de unu el la plej progresemaj urboj en nordokcidenta Usomo; pri ago, nome, de granda urbo kiu senĉese esploras rimedojn por plibeligi kaj plibonigi sin; kiu senhezite alprenas ĉiujn bonajn metodojn, kiujn ĝi vidas sukcese uzataj aliloke; kaj ne timeme atendas ĝis kiam tiuj metodoj jam estas de longe uzataj de aliaj urboj aŭ institucioj. Efektive, la vigla progresemulo ĉiam antaŭeniras, dum hezitemaj konservatuloj plej ofte bedaŭras tro malfrue sian prokraston kaj ŝanceligon.—LA REDAKCIO.

MONTAMARA FESTO estas la nova nomo de granda festo, kiu okazas unufoje en ĉiu jaro en bela licea amfiteatro de la urbo Tacoma. *El pli ol mil nomoj* proponitaj, en granda konkurso pri tio, oni elektis la esperantan nomon, pro ĝia belsoneco, internacieco, kaj ĉarma signifo. (Ĉi tiun nomon proponis S-ro Lehman Wendell, Konsilanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, kaj ni lin kore gratulas pro lia gajno de la premio per tiel bela nomo.)

Kvankam Esperanto jam estas uzita por preskaŭ ĉia celo, jen la unua fojo kiam urbo elektis esperantan nomon

Digitized by Google

por tuturba afero; tia ago plej klare montras la progresemecon de ĝiaj urbanoj. Antaŭ duonjaro la Komerca Klubo kaj la Ĉambro Komerca komencis uzi Esperanton por reklamado, kaj la rezulto estis tiel kontentiga, ke tute nature la Karnavala Komitato volonte alprenis esperantan nomon por la ĉefa festo de la urbo. La festo mem estas vere internacia afero. Kun loĝantoj el preskaŭ ĉiu lando de la mondo, Tacoma estas tipa kosmopolita urbo, kaj en la granda festo partoprenas ĉiuj en la urbo,—amerikanoj, germanoj, skotoj, irlandanoj, japanoj, k. t. p.

La nomo "Montamara Festo" havas belan signifon kiam oni komprenas la geografian situacion de Tacoma. Antaŭ la urbo kuŝas *Puget* (Pjuĝet) Markolo, kiun, pro ĝia beleco, oni prave nomas "la Mezmaro de Ameriko." La haveno estas sufiĉe profunda por la plej grandaj ŝipoj, kaj sur ĝi naĝas ŝipoj venintaj de tre malproksimaj landoj. Tie ĉi ankaŭ sin trovas plezurboatoj grandamase, ĉar la urbanoj pli kaj pli amas la akvon, kaj nun pasigas multe da tempo ĉe la haveno. Ekstere de Tacoma komenciĝas laŭgrada leviĝo de la tero, kiu fine fariĝas la multe laŭdata pinto, Monto Tacoma. Pli ol 14,500 futojn (4417 metrojn) ĝi altiĝas ĉielen, kaj prezentas mirindan bildon, je kiu oni neniam enuas. Spertaj montistoj opinias ĝin la plej belega monto en Ameriko; kaj famaj alpistoj, kiuj jam vizitis ĝin, diras ke en multaj rilatoj ĝi egalas, eĉ preskaŭ superas, la alpojn. "Montamara Festo" do signifas "la festo kie la monto tuŝas la maron," estante nomo, kiu povas aludi sole al Tacoma.

Kiel jam dirite, la "Montamara Festo" okazas en la amfiteatro de la urba liceo. Tiu amfiteatro meritas priskribon. Ĉe la pordoj de la liceo troviĝis antaŭ kelke da jaroj malbela, senvalora valaĉo, kie vivis en mizero kelkaj malriĉaj homoj. Tiel malbela estis la valo, ke la liceo mem perdis multe da sia beleco; kaj anstataŭ admiri la konstruaĵon oni ne povis ne bedaŭri ĝian situacion. Tiam venis viro, kiu proponis konstrui en la valaĉo mirindan amfiteatron, kie la lernantoj de la liceo povos ĝui siajn sportojn kaj kie oni povos doni koncertojn, prezenti teatraĵojn, k. t. p. La ideo estis riskema, tamen ĝi plaĉis al la urbanoj kaj oni tuj komencis amasigi la necesan monon. La sumo baldaŭ estis kolektita, kaj la inĝenieroj entreprenis la herkulesan taskon de konstruado. Kiam la granda konstruaĵo estis finita, ĝi estis 400 futojn (122 metrojn) longa, kaj 390 futojn (119 metrojn) larĝa; ĝi havas sidlokojn por 30,000 homoj, sed ofte ĝi estas superplena, kaj entenas 50,000 homojn. En la konstruado de la amfiteatro, oni formovis 138,000 kubmetrojn da tero, kaj oni uzis 3,400 kubmetrojn da cemento. Ĝi ne estas la plej granda amfiteatro en la mondo, sed sen ia dubo ĝi estas la plej bela kaj la plej mirinda, kiu nuntempe ekzistas. Nia eksprezidanto Theodore Roosevelt diris pri ĝi: "Mi scias pri nenio simila, nenio sur ĉi tiu flanko de la maro, kaj nenio alilande."

Kiam oni sidas en la amfiteatro, en somera tago, kaj rigardas la mirindan panoramon, oni vidas bildon kiu neniam forlasos la memoron. Maldekstre staras la nova muzeo de la Ŝtata Historia Societo, dekstre staras la liceo. Antaŭ la amfiteatro kuŝas *Puget* Markolo, blua kiel sulfura flamo. Sur ĝia akvo la grandaj ŝipoj malrapide en-kaj eliras, dum malgrandaj boatoj naĝas tien kaj reen en nekalkulebla amaso. Sur la alia bordo staras altaj pinioj, post kiuj oni vidas aron da purpuraj montoj. Al la sudo, tra la fumo de grandaj fabrikejoj, oni vidas kvazaŭ tra delikata vualo la neĝan pinton de Monto Tacoma, kies majesta beleco elvokas admiron kaj humilecon.

Tia estas la loko, kie okazos "Montamara Festo," kaj la festkomitato celos prezenti feston tiel unikan, kiel ĝia signifo. La tuta programo por la festa semajno ankoraŭ ne estas preta, sed la festo komenciĝos per koncerto dimanĉon la 30an de junio, kaj finiĝos la 4an de julio per grandega piroteknika elmontrado. Ĉiuj fervojokompanioj jam informiĝis pri la festo, kaj en ties pamfletoj, kiel ankaŭ en la grandaj taĝjurnaloj kaj gazetoj de Ameriko, oni ĉiam estonte parolos pri la granda festo de Tacoma per la Esperantaj vortoj "Montamara Festo." Iom amuza fakto estas ke la profesiaj ludistoj de unu pilkluda aro portos la nomon "Montamara Festo" sur siaj bluzoj dum ili ludas kontraŭ aliaj aroj en konkursoj. Ni ja povas esti certaj ke grandega nombro da homoj lernos parkere ĉi tiujn du vortojn, kaj ilian signifon rilate al Tacoma.

Digitized by Google

# *Foreign News*

FRANCE.—There are at present conducted in Paris sixty-two regular free public courses in Esperanto. This is entirely separate from the "groups," some fifty of which make up the Paris Esperanto Society, although each group has its own officers and regular time and place of weekly meeting. A course for Bohemians in Paris, conducted by a Bohemian, should also be added to the above list.

A new magazine, *Le Travailleur Esperantiste,* has been founded in Paris, to further the organization of esperantists of the laboring classes, and promote their interests (subscription, 45 cents per year).

Having made a satisfactory entrance into aviation, Esperanto is next heard of on the turf, the horses "Ideo," "Flava," and "Esperanto" having recently made at Vincennes records which seem to have been worth noting.

A lecture on Esperanto at Cours, illustrated by lantern slides, was followed by the organization of two new courses.

An audience of nearly 500 enjoyed a very successful Esperanto entertainment in Lyon recently.

A group has been organized at Toul, with weekly meetings in the City Hall.

The Angiers Chamber of Commerce has appropriated a sum of money to further the work of the local esperantist club.

The city government of Rouen has set aside a sum of money to aid the work of the local Esperanto group.

At Lons-le-Saulnier an audience of 600 persons was addressed on the subject of Esperanto, with an officer of the lycée presiding, and music furnished by a local musical organization.

At St-Nicolas an Esperanto entertainment attracted an audience of 400 persons, and proved very successful.

The February issue of *La Movado* quotes (as quoted in the *British Esperantist* a short time ago,) the account given in AMERIKA ESPERANTISTO of the sending of a wireless greeting in Esperanto between Dr. Yemans, Mr. Reed, and the wireless operator on still a third ocean liner last summer.

Part of the article by Mr. Parrish, in AMERIKA ESPERANTISTO of last July, is quoted in the February issue of *Normanda Stelo.*

SPAIN.—The Catalonian Esperantist Federation has announced its second literary contest, which by the way is open to esperantists of all countries. Competing manuscripts must be received before the tenth of May, at Carrer de Gracia 12, Sabadell. Over a dozen prizes are offered by individuals, magazines, government officers, the city government of Terrassa, etc., the list being received a little too late for detailed publication in this number of AMERIKA ESPERANTISTO.

HOLLAND.—A Catholic Esperantist workmen's club has been organized, with some seventy members, in the Hague.

IRELAND.—At a well attended meeting of the Dublin University Biological Association, a lecture on Esperanto was given, and aroused much interest in the subject. At its close the Provost of the University not only proposed a vote of thanks to the lecturer, Dr. G. Jameson Johnston, but recommended to the students that they learn the language. Favorable reports were published in both the *Irish Times* and *The Mail.*

SWITZERLAND.—An association of Swiss esperantist physicians is in process of formation. From Switzerland come also reports of one good audience after another to hear the lectures on California given by Mr. Parrish.

GERMANY.—The many esperantist groups in Berlin have united into a federation called the "Esperanto-Verband Gross-Berlin." A general meeting will be held once a month.

The organ of the Dresden society, *Mitteilungen,* publishes a list of some hundred and eighty business addresses at which Esperanto can be used. The addresses vary from those of doctors, lawyers, banks, shops, manufacturers,

Digitized by Google

etc., to tourist bureaus and hotels, and also include a number of police stations as well as police headquarters.

In Nuremberg seventy-eight policemen are taking a course in Esperanto.

The *Deutsche Warte* (Berlin) is publishing in its Esperanto department a series of Travel Impressions by Jean Borel (former editor of the *Germana Esperantisto*), relating incidents in Greece, Jerusalem, and other southeastern regions, showing how constantly he was aided by Esperanto and how pleasurable his trip was made through the courtesy of esperantists.

The union of German dentists in Cologne has arranged for its members an Esperanto course, with a view to making practical use of the language at the next international dental congress.

In one city after another good audiences are assembling to hear Mr. Parrish lecture in Esperanto on the beauties of California.

BOHEMIA.—A new socialist magazine, *La Kulturo,* published in Esperanto and Bohemian, has been founded in Prague, as the official organ of the local esperantist Workmen's Association.

In Kladno a new course with about forty students is announced. The local group received a medal for its display of Esperanto material at a recent exposition.

In Mikulovice compulsory courses of Esperanto have been put in all three classes of the public schools. An evening course is also given for adults.

AUSTRIA.—Official notice has been given to all officers and soldiers in Vienna who desire to take a course in Esperanto, to so notify the city commandant. A course of 12 lessons will be given in the examination hall of the caserne.

POLAND.—Events in Cracow point to energetic preparations for the coming international congress of Esperanto. A hundred postmen are already studying the language, governmental aid of various sorts is promised, and details of the program of the congress week are being worked out. The price of the congress ticket has been placed at six *spesmiloj,* and an unusually handsome badge is to be given. A half-price ticket will be issued to members of the families of congress members, who wish merely to attend the meetings and festivities but do not care for the official documents, etc. A similar three-*spesmilo* ticket will be issued to blind congress members. The first hundred persons who enroll for the congress will each receive as premium a copy of the song "La Tagiĝo" by Grabowski. Early registration is earnestly requested. The address is simply "VIII Esperantista Kongreso, Krakow, Galicia, Austria."

ROUMANIA.—Three new public courses are reported from Bucharest.

The Queen of Roumania was among those who sent telegrams of condolence and sympathy to the Roumanian Esperantist Society, on account of the death of Dr. Robin.

BULGARIA.—The Esperanto group of Sofia has taken the initiative in organizing a general Bulgarian Society, and it is expected that much good will result from the concentrated and cooperative work which can thus be accomplished.

GREECE.—Statistics from Samos inform us that during the school year of 1911-1912, Esperanto was taught by fifty instructors, to 1,740 pupils in thirty-one cities of Samos, in accordance with the law concerning this matter.

RUSSIA.—In Odessa all the eighth-grade pupils in one of the local schools are studying Esperanto.

A three-day exposition of Esperanto material belonging to Mr. N. Foss (an occasional contributor to AMERIKA ESPERANTISTO), has attracted much attention, and the number of esperantists is showing satisfactory increase.

An audience of some 500 persons assembled in Moscow to hear Mr. Privat, of Switzerland, addresses in Russian being also given on the general subject of Esperanto, and an attractive musical program rendered. From Moscow, Mr. and Mrs. Privat went to St. Petersburg, where, although all advertising of the matter by printing of announcements, placarding, or even newspaper publicity was forbidden, a satisfactory audience gathered to hear Mr. Privat's address, which was translated into Russian and followed by other addresses in Russian on the general theme of Esperanto.

Digitized by Google

SIBERIA.—At a charity ball and entertainment in Ĉita not long ago a large part of the program was in Esperanto, and much interest was aroused among those present.

CAUCASUS.—The editor and entire staff of an important Armenian journal in Tiflis, devoted to commerce and industry, are all studying Esperanto.

JAPAN.—The Japanese labor journal in Tokio printed the constitution of the labor union in Japanese and Esperanto.

A new monthly, typically Japanese in manner of arrangement, illustrations, stitching, and content, has been started in Tokio, with the title *Orienta Azio.* It contains forty pages (as we learn *by counting them*), and the advertisements are quite as interesting reading as the literary portion. The amount of Esperanto exceeds the Japanese, and the magazine is such that we trust it will prove a successful enterprise (Subscription, 70 cents).

NORTH CHINA.—A letter from Tangshan informs us that Mr. F. A. Foster, of the Tangshan Engineering College, who is a member of the Esperanto Association of North America and regular subscriber to AMERIKA ESPERANTISTO, recently gave a lecture on Esperanto before the local Debating Society. We also thank Mr. Foster for a copy of the *Pekin Daily News* (printed partly in English for the benefit of the English residents), on whose front page appears a letter to the editor, written from the office of the secretary of the Esperanto Association of North America, on the subject of Esperanto.

FIJI.—In the Levuka public school, whose headmaster is a fervent esperantist, every pupil is taught Esperanto.

# Some Pertinent Quotations

### CONFUSION OF TONGUES AT OPIUM CONFERENCE.

The Hague, Jan. 17.—The International opium conference, which is here, is not having an easy time of it.

Among other difficulties that of language is conspicuous, for the president of the conference himself (Bishop Brent of the Protestant Episcopal Church in the Philippines) is not familiar with French, and the majority of the speeches and reports have been made in English to be subsequently rendered into the official French by way of the Dutch language.

Even the official stenographer of the conference is not fully conversant with French.—*The New York Globe.*

### FROM "THE SUPERIOR CIVILIZATION OF GERMANY."

Germany is not so much a nation of thinkers as a nation thinking. This is made possible from a compact population all speaking the same language. Such a collective intelligence is not yet possible in the United States, where the population is widely scattered and where in some cities forty or fifty languages are spoken. * * * Again, it is easier to recognize responsibility for those of your own race who speak your own language than for the multitudinous races who are a people apart in the United States. * * * A common language for Europe would save hundreds of thousands of years of labor, annually now spent by the people in learning two or three languages, and do more for international peace than a hundred Carnegie Foundations; and if a common language, why not German? Fifty years ago twice as many people in Europe spoke French as German. Today twice as many people in Europe speak German as French.—*Twentieth Century Magazine* (Boston).

### WANTED—A COMMON LANGUAGE FOR THE UNITED STATES.

We talk about the various dialects of India and China and the difficulty of work in those countries because of this condition. But here is a parallel right in this country, and in old New England at that. One of the chief causes of the riots in connection with the recent labor troubles in Lawrence, Mass., was the fact that forty-five nationalities were at work in these mills who had been trained to hardly anything excepting the art of

Digitized by Google

counting the contents of the pay envelope. Thousands of them could scarcely speak a word of English. So when they found that their envelopes were short, as they supposed, they could not be made to understand that the new scale of hours was to blame. Hence the riots. What a task is before this nation in educating the thousands of foreigners throughout the country, for the Lawrence situation could be duplicated in many other parts from Maine to California. A common language is as necessary here as in China. —*The Epworth Herald.*

EDITORS' NOTE: Would not the use of Esperanto solve all the above described difficulties? Is it not the duty of you who read these quotations to send a little information (unmixed with any criticism) to the above magazines, telling them how satisfactory Esperanto has already proved itself to all who use it?

# *Kroniko Nordamerika*

BOSTON, MASS.—La loka societo ŝanĝis sian "1915 komitaton" al "financa komitato," ĉe antaŭnelonga kunveno.

ITHACA, N. Y.—La Esperantista grupo elektis la jenajn provizorajn oficistojn: prezidanto, S-ro E. E. Silverman; sekretario-kasisto, H. B. Frost.

PITTBURGH, PA.—Esperanta Klubo estas organizita ĉe la Universitato de Pittsburgh, por helpi al la laboro de la "Cosmopolitan Club" rilate al pacifismo. La oficistoj estas: prezidanto, S-ro Jaagannath Khanna; vicprezidanto, S-ro Ph. Geliebter; sekretario, S-ro G. Raymond Emery; helpa sekretario, S-ro E. W. Armour; kasisto, S-ro R. F. Brenner. S-ro J. M. Clifford, Jr., el Pittsburgh, unu el la pioniroj en la Esperanta Movado en sia urbo kaj ŝtato, gvidas la kurson por ĉi tiuj progresemaj studentoj. Ĉe la Publika Biblioteko kunvenas ĉiuvendrede grupo, kies instruisto estas S-ro Clifford, sekretario de la Pittsburgh Societo.

PHILADELPHIA, PA.—La Filadelfia Esperantista Societo kunvenas dufoje (la unuan kaj la trian lundojn) ĉiumonate en la "rondo," neceremonia kunveno ĉe la sekretariino, F-ino Margaret A. Maisch. Ĉiam estas ia interesa ludo aŭ alia praktikrimedo. Je la lasta oni provis "konsekvencojn," bone konatan kaj ĉiam amuzan ludon el la angla.

Alia institucio de la loka grupo estas la "barĉo," aŭ esperantista vespermanĝo. Je la lasta vendredo de ĉiu monato oni kunvenas ĉe la Windsor hotelo, kaj ĝuas Esperantan programon kaj interparoladon. Inter aliaj ĉe la lasta barĉo ĉeestis S-ro Haynes, el Anglujo, kiu nun komercie vizitas Usonon pro sia firmo en Kubo.

La kurso instruita dum la vintro de S-ro Levene ĵus finiĝis, kaj la kursanoj nun estas pretaj por la ekzamenoj por la "Atesto pri Lernado." Post nelonge komenciĝos nova kurso en la "Central Manual Training" Lernejo, gvidota de S-ro Henry W. Hetzel, kiu ankaŭ instruas grupon en Germantown, antaŭurbo de Filadelfio.

Dum la lasta semajno de marto la esperantistoj havis ekspozicion ĉe la butiko de S-ro Reilly, librovendisto. Profesia fenestrarangisto ornamis la montran fenestron, lokigis la esperantaĵojn, k. t. p. Oni esperis ke pro ĉi tiu ekspozicio la intereso je Esperanto multe kreskos en Filadelfio.

Post longa intertempo pro morto de unu el la familio de sia redaktoro, la organo de la loka societo, "Stelo Esperantista" reaperis. Ĝi nun enhavas kvar paĝojn krom la kovrilo, kaj estas senpage sendata al anoj de la societo.

Interesa antaŭnelonga okazintaĵo, montrante la utilecon de Esperanto, estas la jena: Esperantistino en Filadelfio ricevis leteron de juna franca korespondantino kiu petis informon pri onklino, kiu, irinte al Filadelfio, ne skribis de kelkaj semajnoj al la hejmo. La usona esperantistino tuj faris esploron, kaj sciiĝis ke la onklino de ŝia korespondantino mortis antaŭ du semajnoj. Informinte sin pri ĉiuj detaloj de la malsano, enteriĝo, k. t. p., ŝi skribis ilin al sia korespondantino en Francujo. La franca familio respondis per dankema letero, dirante ke ĉar ili ne komprenas la anglan lingvon, kaj konas

Digitized by Google

neniujn francojn en Filadelfio, ilia sola rimedo estis Esperanto kaj la afabla helpo de la Filadelfia' esperantistino.

TRENTON, N. J.—La jurnalo *Daily State Gazette* presigis bonan artikolon pri Esperanto sur sia redaktora paĝo.

JACKSONVILLE, FLA. — Artikolo duonkolonon longa pri Esperanto aperis antaŭ nelonge en la jurnalo *Florida Times-Union,* bone klarigante pri la karaktero de la lingvo kaj ĝia celo, kaj montrante kial ĝi estas necesa. Aliloke en la sama numero la redaktoro presigis informon pri la proponata leĝo pri Esperanto, kaj donis la adreson de la Esperanto-Oficejo por helpi al interesitoj.

FAR, W. VA.—Pro la klopodo de S-ro Clyde Kennedy, kiu antaŭ unu jaro estis la sola esperantisto en Wetzel graflando, kelkaj personoj nun studas la lingvon, kaj multaj jam montris iom da intereso. Du jurnaloj, la *Wetzel Tribune* kaj la *Wetzel Republican,* konsentis enpresi novajon pri Esperanto, kaj estas favoraj al la afero.

DE KALB, ILL.—Oni pripensas la enmetadon de Esperanto en la oficialan horaron de la loka Supra Lernejo, kaj tial nun esploras pri lernolibroj, k. t. p. por povi plej oportune aranĝi ĉion.

ROSS, IOWA.—S-ro John L. Rutherford jam verkis kelkajn artikolojn pri Esperanto, por la *Philatelic West,* kiu estas la plej granda jurnalo por kolektistoj de poŝtmarkoj kaj moneroj en Usono. Responde al petoj por plua informo, S-ro Rutherford ankaŭ skribis multajn leterojn kaj disdonis ekzemplerojn de "Elements of Esperanto" al tiuj, kiuj montris intereson.

NOWATA, OKLA.—La loka klubo nun enhavas dek anojn, kaj kunvenas dufoje en la semajno, en la Supra Lernejo. La instruantoj estas S-ino Ruth Dean kaj S-ro Jesse I. Van Huss. Ĉiu el la du lokaj tagjurnaloj bone raportis pri la klubo.

FORT COLLINS, COLO.—Dufoje presiginte artikoletojn pri Esperanto, poste la jurnalo *Morning Express* presigis du stancojn el "l'Espero," kun angla traduko farita de D-ro Schofield.

TACOMA, WASH.—La lokaj jurnaloj, precipe la *Ledger* kaj la *Daily Tribune,* donis bonegajn raportojn pri la decido doni al la granda urba festo la novan nomon "Montamara Festo," klarigante la signifon de la esperantaj vortoj, kaj kial la komitato opiniis ĉi tion la plej bona nomo, el ĉiuj nomoj proponitaj (vidu aliloke en AMERIKA ESPERANTISTO).

SAN FRANCISCO, CAL.—Pro la klopodo de S-ro R. E. Blackstone kaj S-ro Fred Rivers (el Tacoma), estas organizita vigla grupo, kiu praktikas Esperanton per ludado de "divenaj konkursoj," kaj aliaj ludoj kiuj donas okazon por interparolado. S-ro Blackstone intencas aranĝi paroladojn pri Esperanto ĉe multaj kluboj en la urbo, kaj per tio oni esperas "esperantigi" San Francisco'n kiel eble plej multe.

PORTLAND, ORE.—S-ro Denlinger nun faras interesan eksperimenton kun kvar knaboj, kiuj havas de kvin ĝis dekdu jaroj. Li instruas al ili Esperanton tute buŝe, eĉ ne montrante al ili libron, kaj ili komencas bone posedi la lingvon. La kvin grupoj, jam nomitaj en AMERIKA ESPERANTISTO, ankoraŭ bone laboradas, kaj ekzistas ankaŭ klubo da viroj, kie oni ĉiusemajne praktikas interparoladon esperantan.

McMINNVILLE, ORE.—La loka grupo donis "Valentine" feston la 14an de februaro ĉe la hejmo de Kolonelo J. C. Cooper, eĉ presiginte por tiu specialan invitan poŝtkarton, kiu estas vera "valentine."

ANACORTES, WASH.—Okazis ĉi tie festo, kie la fraŭloj aranĝis por la fraŭlinoj tre agrablan vesperon. S-ro F. J. Zent respondis al unu el la tostoj per paroladeto pri "Esperanto, la plej bela lingvo por geamantoj." La festo estis tute sukcesa, kaj kompreneble ĝi bone reklamis Esperanton, per la interesa tosto de S-ro Zent.

---

Li—"Ĉu vi aprobas la dancadon?"
Ŝi—"Ne."
Li—"Kial ne?"
Ŝi—"Ĝi nur estas ĉirkaŭprenado kunigita kun muziko."
Li—"Nu, kio estas en tio, kion vi ne aprobas?"
Ŝi—"La muziko."

***Tradukis*** Ho Ho.

Digitized by Google

# *Official Communications*

*Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.*

## *The Esperanto Association of North America*

***Central Office: Washington, D. C.***

### ESPERANTO HERALD NO. 14

The February number of the little Esperanto Herald (No. 14) is the smallest which has yet been published, but contains two very important matters.

This number is entitled "Governmental Action about Esperanto." A copy of *House Resolution* 220, introduced into the Congress of the United States, and a resumé of the decision of the U. S. Commissioner of Patents, in which Esperanto is declared to *be a language,* make up the content, and furnish a convenient way of silencing the would-be scoffer who, judging others by his own ignorant state, says "Who ever heard of Esperanto?"

As usual, this is sent free to members of The Esperanto Association of North America, and to any other on receipt of 2 cent stamp. On this particular number the following prices are given for quantities: To one address, ten for eight cents, twenty-five for fifteen cents, fifty for twenty-five cents. One-cent stamps are accepted in payment.

---

### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

(*Atesto pri Lernado*)

L. B. Richardson, Methuen, Mass.
Samuel W. Thomas, Brooklyn, N. Y.
Miss P. E. Curtis, New York City.
Clyde Kennedy, Far, W. Va.
Jacob Malachopsky, Pittsburgh, Pa.

### PASSED ADVANCED EXAMINATION.

(*Atesto pri Kapableco*)

Miss Sybil E. Bailey, Cleveland, O.
Fr. Jerome, St. Leo, Fla.

### YOUR CAMPAIGN

I desire especially to call the attention of all members of The Esperanto Association of North America to the short article with the above heading, elsewhere in this same number of Amerika Esperantisto. This campaign for publicity by means of furnishing to newspapers and magazines a letter which tells their readers what the U. S. Government is doing about Esperanto, and how each one may secure free information about Esperanto, is distinctly *your* campaign. It may not bring any great increase to our membership just now, but it will at least make Esperanto known to thousands who now have only a vague idea about it.

The persons who read this letter are advised to send name and address with a stamp for a copy of "A Glimpse of Esperanto." With this copy of the Herald is also sent a copy of "General Information," or any other number of the Esperanto Herald which would evidently appeal particularly to the writer of the inquiry. The number of inquiries increases in almost geometric progression. To keep up the growth, and get results, *your help is needed.* The inquiries can only be produced by the publication of this letter, to secure which we depend upon you *individually.* Send it to weekly and monthly magazines, both popular and technical, as well as newspapers.

And that the printing may be continued, and postage paid, we must receive just a little help from you all in a financial way, or else a heavy burden is left resting on a few shoulders. Will you not secure a wide publication for this "editor letter," and will you not mail a dollar to the Association, to pay

Digitized by Google

for more ammunition? We will see that all inquiries are answered, as fast as received, and from time to time will tabulate them by states and cities, and send you the names and addresses, so that you may invite these new recruits to join your local society, or to help you form a society.

EDWIN C. REED,
*General Secretary.*

## SINJORO EDMOND PRIVAT.

At the request of my friend, S-ro Privat, I sent out a circular a few weeks ago to some of the Esperanto societies notifying them that he was planning soon to arrive in this country for a two-months propaganda tour.

I had also prepared an article, concerning the same matter, to appear in this number of AMERIKA ESPERANTISTO. Just as the proof was being read for this number and the pages were being made up, word was received that he had been taken suddenly ill owing to overwork in his tour through Europe, and would not be able at this time to come to America. With much regret, therefore, I take this method of notifying those, to whom I have previously written, that we shall not have S-ro Privat with us.

EDWIN C. REED.

## TREASURER'S REPORT

JANUARY RECEIPTS

| | |
|---|---|
| Balance on hand Jan. 31 | $1.22 |
| Membership dues | 52.00 |
| Examinations | 11.80 |
| Sustaining Membership fees | 3.00 |
| Special Membership fees | 4.50 |
| Contributions | 1.55 |
| Sale of Heralds | 7.52 |
| | $81.59 |

EXPENDITURES.

| | |
|---|---|
| Postage | $15.47 |
| Examinations | 9.75 |
| Office Rent | 7.50 |
| Repaid loan of E. C. Reed | 45.00 |
| Balance on hand Feb. 28 | 3.87 |
| | 81.59 |

## WATCH FOBS.

After the winding up of the affairs of the Sixth Congress, a number of the handsome Congress badges were turned over by the Congress Committee to THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. These are for sale at 25c each, with a leather strap attached, and make an effective watch fob. Are you wearing one? If not, do you not want one?

# *National Esperanto Convention*

AS has been previously announced, the next annual meeting of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, and convention of all Esperantists of the country, will be held in Boston, Massachusetts, under the auspices of the NEW ENGLAND ESPERANTO ASSOCIATION and BOSTON ESPERANTO SOCIETY.

The convention proper will meet July ninth, tenth and eleventh, and the committee plan in addition to have some post-congress events for a day or so thereafter for all who will be able to stay more than the three days.

To be admitted to the events of the congress, one must provide himself with a congress ticket. These "congress tickets" are now on sale at one dollar each, and it is hoped that all who contemplate attending the convention will at once enroll, in this manner letting the committees have a more definite idea of the probable attendance. Tickets are on sale by Dr. C. H. Fessenden, Secretary New England Esperanto Association, 34 Pelham Street, Newton Center, Mass., or by Edwin C. Reed, General Secretary, Esperanto Office, Washington, D. C.

The entertainment committee is especially anxious, not only to have an interesting program, but to make the program one in which the participants are drawn from all parts of the "Nordamer-

Digitized by Google

ika Esperantujo." Those who hope to attend are therefore urgently requested to state whether or not they will take part in the entertainment features of the meeting, and tell what particular talents they possess. *Modesty in this matter will not be considered a virtue!*

Although naturally the work of preparation and final decision on matters must be done in and about Boston, suggestions for convention features will be welcomed from all, and should be sent to Dr. Fessenden at above address.

## PLEASE DROP A LINE.

On pages 143-144 of the *Smart Set* for March may be found an attractive story (in French),, entitled "L'Esperanto." We request the readers of AMERIKA ESPERANTISTO to write a letter or postcard to *Editor, The Smart Set, 452 Fifth Ave., New York,* thanking him for this story, and adding the hope that under the new and progressive management of the *Smart Set* this interesting theme will recur in other stories, in English as well as in French, whose readers are necessarily more limited.

## NEKROLOGO.

Kun granda bedaŭro ni raportas pri la morto de du bone konataj esperantistoj, kiuj multe laboris pro la Internacia Lingvo:

S-ro Amatus Van der Biest, prezidinto de la Sepa Kongreso, verkisto, tradukisto, kaj senlaca propagandisto, mortis en Antverpeno la 22an de januaro. Lia urbo kaj lando lin jam honoris per kelkaj ordenoj, kaj la reĝo de Hispanujo ankaŭ prezentis al li ordenon dum la Kongreso.

D-ro Gabriel Robin, tradukinto de esperantaj lernolibroj, fondinto de la Rumana Esperantista Societo, fervora propagandisto kiu multe progresigis la movadon en sia lando, kaj helpis aranĝi efikajn interrilatojn kun la bulgaraj esperantistoj, redaktoro de la rumana-bulgara organo *Danubo,* mortis la 26an de decembro, 1911. Li estis bone konata en sia lando kiel ĥemiisto kaj bakteriologiisto, estro de urbaj hospitaloj, fondinto de la plej malnova medicina societo en Rumanujo, k. t. p.

Pro la usona esperantistaro, AMERIKA ESPERANTISTO esprimas plej sinceran simpation, pri ĉi tiu granda perdo kiun suferis la tuta esperantistaro.

## ATENTU, ESPERANTISTOJ!

Bonvole helpu, per simpla poŝtkarto!! Ni atentigas al vi ke ĵus aperis en la tagĵurnalo *Milwaukee Journal* paragrafo kiu donas al la publiko tute malpravan ideon pri la stato de Esperanto, kaj ĝia utileco. La paragrafo diskutas la "malfeliĉan sorton" de la tiel nomita "Esperanta infaneto" (nome, infaneto de unu fervora usona esperantisto kiu anoncis, kiam ŝi naskiĝis, "Ŝi parolas sole Esperanton!"). Kompreneble ni ĝojas ke la usona gazetaro tiel multe reklamas nian aferon, ŝercante pri tiu fakto; tamen, kiam ĵurnalo tute senintence (nur pro manko de informo) presigas malverajn vortojn pri Esperanto, estas la tuja devo de ĉiu esperantisto korekti tion. Tial, ni petas, ni petegas, ke ĉiu esperantisto tuj skribu afablan poŝtkarton al *Redaktoro, Milwaukee Journal, Milwaukee, Usono,* dankante al li ke li traktis iel ajn la temon Esperanton, sed bedaŭrante ke liaj raportistoj tiel malprave raportis al li pri la faktoj, kaj petante ke li presigu novan artikolon, kiu donos faktojn pri la Esperanta lingvo kaj la Esperanto-Movado. Jen traduko de la aluditaj vortoj en la ĵus aperinta artikoleto "The Esperanto Baby":

Se ŝi ja akiros ambaŭ lingvojn (Esperanton kaj Anglan), kiom ŝi profitos? Ŝi renkontos nur malmultajn homojn, kiuj povas paroli Esperante; nenia valora verko estos esperante verkata, kiu ne estos ankaŭ verkita en iu alia lingvo, kaj ĉiu verko, kiu valoras tradukadon en Esperanton, estos tradukita anglen. La lingvo de iu ajn fremda nacio valorus pli multe. Ni konas kelkajn infanojn, kiuj parolas nur france al la patro, kaj angle al la patrino. Pro tio, ili ĝuas la literaturajn kaj sociajn profitojn de la franca lingvo. Sed, se ni havus la tempon por lerni novan lingvon ĉiujare, estus longa tempo antaŭ ol ni alvenus al Esperanto. Ni preferus al ĝi ĉiujn lingvojn de Eŭropo, ankaŭ la ĥinan kaj japanan lingvojn.

Digitized by Google

# For the Beginner

***I wish you would treat the subject of "-ig" causative. There is certainly some distinction between the use of "-ig-" disconnected and the same "-ig-" used as a suffix.***

The independent use of -ig- to form a verb, as in *oni igas ĝin malaperi,* is grammatically defensible, but it is often proof of an awkwardly constructed sentence. Rewriting the sentence without the use of *-ig-* in independent form generally improves the effect. The general tendency in the best literature seems to be against too free use of suffixes as independent words, except a few like *ebl-, estr-,* etc., which are almost like adjectival or other roots in meaning.

***In the word "fervojo" is the first -o- one syllable and the -jo another, or is this an -oj- followed by an -o?***

A consonant between two vowels is generally allotted to the one following it, in any language, and remains consonantal in effect, even if it be of such character (a semi-consonant) that it forms a diphthong when no vowel thus follows. Therefore the word in question is *fer-vo-jo.* But if pronounced smoothly together, the end of the second syllable glides into the beginning of the third, giving a slight diphthongal effect. A separation *fer-voj-o* would be objectionable as compelling either a halt between the second and third syllables (a glottal stop), or a doubling of the *-j-* sound, giving the effect *fer-voj-jo.*

---

## KIAL LA PASERO MARŜAS SALTE

Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la fiŝoj loĝis en la aero, kaj la ŝipoj velveturis trans la montoj, la testudo regadis la mondon; ĉar la plej efika rimedo por kontraŭstari kapturnigan marŝadon de la regatoj estis la saĝa trankvileco de la reganto.

Estis en tiu reglando vasalo tre aroganta kaj fiera, kiu volis ĉiam trudi al la aliaj samlandanoj sian opinion, pretendante ke liaj dirajoj superis tiujn de ĉiuj kunvivantoj en tiu lando. Tiu nerimarkinda fanfaronulo estis nomita Pasero. Tio, kio plej kolerigis lin, kaj vundis la memamon, estis la rapideco kun kiu kuris samurbano nomita Alaŭdo. La envio kiun li montris al ĉi tiu, kiu estis mirinda kantisto pri la ĉarmoj de superaj regionoj, estis tia ke li volis konkursi kun Alaŭdo en kurado, kaj faris la plej originalan veton en la mondo.

Ili interkonsentis pri kurado de mil mejloj, kondiĉe ke la venkito restu sklavo de la venkinto, farante Perdrikon la sola juĝanto pri la kurado kaj sola plenumiganto de la kondiĉoj. La kurado komencis, oni ne scias la lokon, nek la tagon,

## WHY THE SPARROW HOPS.

Many centuries ago, when the fish dwelt in the air, and the ships sailed across the mountains, the tortoise ruled the world, for the most efficacious means of withstanding a dizzy pace on the part of subjects was the wise tranquillity of their ruler.

There was in that kingdom a vassal, very arrogant and haughty, who wished always to obtrude his opinion upon other people who lived in the same country, with the claim that his remarks surpassed those of all his fellow inhabitants in that country. That insignificant boaster was named Sparrow. The thing which most wounded him, and piqued his self-love, was the rapidity with which a fellow citizen named Lark could run. The envy which he exhibited toward the latter, who was a marvelous singer about the charms of the upper regions, was such that he wished to contest with Lark in a race, and made the most novel wager in the world.

They agreed upon a race of a thousand miles, on condition that the one beaten should remain a slave of the conqueror, making Partridge the sole judge of the race, and sole executor of the conditions. The race commenced, its location not being known, nor the day, nor

Digitized by Google

nek la horon; sed la rezultato estis fatala por la malhumila pasero, ĉar enviemulo ĉiam suferas pro sia propra envio.

La perdriko deklaris la venkon je la alaŭdo, kaj adiaŭis, lasante la paseron sklavo de la venkinto. Ĉi tiu enkarcerigis kaj katenis la paseron, premante la ĉenpremilojn tiel forte, ke ties kruretoj baldaŭ ŝvelis, kaŭzante al la pasero la plej akran doloron. Li jam ne povis kuri, nek marŝi; kaj la akreco de la suferado devigis lin salti tre nerveme.

La alaŭdo fine kompatis la katenitan malliberulon, kaj proponis al li liberecon, kondiĉe ke li kaj liaj geidoj ĉiam marŝu salte, neniam intencante ree konkursi kun iu ajn birdo. La pasero, ĉu por eviti la teruran doloron produktitan de la ĉenpremiloj, ĉu por rehavi la liberecon, kiu estas plej natura ĉe birdoj, akceptis la proponon; kvankam li klare komprenis ke tio estas tre humiliga por lia natura malhumileco.

De tiam, la pasero ne marŝas plu, sed saltas. Kaj kiel la unuan lecionon, li instruas al siaj geidoj la historion pri tiu solena promeso, enradikigante en ilin la plej severegan plenumadon, kaj ordonante al ili ke tio estu la unua devo kiun oni instruos al la geidaro en estontaj generacioj. Tial, kiam la pasero staras sur la tero, ĝi unue saltas kelkfoje, rememorante sian antikvan sklavecon, kaj la prezon de sia reaĉeto.

MARIANO MOJADA.

the hour; but the result was fatal for the overproud Sparrow, since the envious invariably suffer from their own envy.

The partridge awarded the victory to lark, and bade farewell, leaving the sparrow a slave of the conqueror. This latter emprisoned and enchained the sparrow, pressing the chain-fastener so hard, that the sparrow's little legs soon became swollen, causing the most acute suffering. Already he could neither run nor walk; and the acuteness of the suffering compelled him to hop in a very nervous fashion.

The lark finally took pity upon the enchained prisoner, and proposed to him his freedom, on condition that he and his descendents forever hop, never again intending to compete with any bird whatsoever. The sparrow, whether to avoid the fearful pain produced by the chain-fastenings, or to regain his liberty, which is most natural in the case of birds, accepted the proposition; although he clearly understood that that was very humiliating for his natural haughtiness.

From that date, the sparrow no more walks, but hops. And as the first lesson, he teaches to his young the history about that solemn promise, inculcating in them the most uncompromising fulfilment, and ordering them that this shall be the first duty which will be taught to the young in future generations. Therefore, when the sparrow stands upon the ground, it first hops a few times, remembering its ancient slavery, and the price of its ransom.

## PENSO DE VILHELMO MORRIS.

Estas prave kaj necese ke ĉiuj homoj havu laboron por fari, kiu estas farinda, kaj estas per si agrabla; kaj kiu estas farata sub tiaj kondiĉoj, kiaj faras ĝin nek tro teda nek tro maltrankviliga. Kiel ajn mi konsideras tiun proponon, kiom ajn longe mi ĝin pripensas, mi ne povas decidi ke ĝi estas supermezura postulo; ankoraŭ ree mi diras, ke se la socio volus aŭ povus akcepti ĝin, la vizaĝo de la mondo ŝanĝiĝus; malkontento kaj malpaco kaj malhonesteco finiĝus. Senti ke ni faras laboron utilan al aliaj, kaj plaĉantan al ni mem, kaj ke tia laboro kaj ĝia prava rekompenco ne povus manki al ni!—Kiu grava malbono povus tiam okazi al ni?

*El la angla tradukis*
WYATT RUSHTON.

Digitized by Google

# Proksime de Princino

DU semajnojn la afiŝejoj de la urbo estis anoncantaj la venon de la Ringpo'a cirko, kaj fine ni staris ĉe la stratkruco, rigardante la grandan paradon. Ĉe la fronto de la procesio estis aro da muzikistoj, dudek je nombro, kaj, kiam ĝi preterpasis nin, naskiĝis en mi fortega deziro esti unu el ili, kaj la deziro ŝajnis pli efektivigebla, tial ke inter ili ne estis klarnetisto.

Irinte al la loko, kie la cirko estis okazonta, mi turnis min al la estro, por atingi lokon inter la muzikistaro, kaj bonŝance oni dungis min, dirante ke mi aniĝu la sekvantan tagon. Nun mi trafis la zeniton de miaj muzikaj celoj; kaj la morgaŭan tagon mi ekkomencis.

Ĉi tiu cirko estis "vagono-spektaklo," tio estas, ĝi veturis de urbo al urbo per ĉevalveturiloj, kaj mia sidejo estis sur la tria artiko de agla flugilo, skulptita sur la muzikbanda vagono. Iu jaluza klarnetludisto diris al mi, ke mi similas paraziton sur la nacia birdo.

Akompanis la cirkon la kutima kromspektaklo, kiu enhavis, kiel unu el la allogaĵoj, Cirkasan Princinon, kaj, efektive, ŝi estas la sola reĝa persono, kiun mi iam renkontis.

Tuj antaŭ la malfermo de la granda spektaklo, la muzikistaro staris apud la eniro de la pli malgranda tendo, kaj tie faris specon de sono, kiun ni mem pensis muziko. Poste, ni eniris internen kaj ree penis montri nian lertecon.

Mia unua sperto en tiu flanka spektaklo fariĝis epoko en mia kariero, ĉar, unue ekrigardinte la princinon, mi estis perdita viro! De tiam, unu el miaj okuloj zorgis sian okupadon pri la muziknotoj; la alia algluiĝis al la bela vidaĵo, kiu sin trovis sur la estrado. Ja estas iom da vero en la kutima kredo, ke se oni suĉos citronon antaŭ ludisto de ia blovinstrumento, tuj elfluas malgranda rivereto el la buŝo de la ludisto. Ĝuste nun, mi ne esprimas mian propran opinion pri tiu afero sed dek citronoj tiamaniere suĉataj estus al mi nenio, kompare kun tiu ensorĉa belulino, kiun mi rigardis altplezurege, kaj kiu siaflanke rekte rigardis min. Troa malsekaĵo fluetis malsupren sur mia vizaĝo, kaj pendis ĉirkaŭ la B-mol klavo de mia klarneto.

Mi ja konfesas ke mi enamiĝis; efektive, ĉi tio estis ia amo unuavida. Mi rememoris ke Mario, reĝino de Skotlando, enamiĝis je Rizzio, la mandolinisto, kaj ke la princino Ŝime (Chimay) pro amo forkuris kun Rigo, la violonisto; kaj mi ne povis ekvidi kial ĉi tiu princino cirkasa ne povus enamiĝi je Stinger, la klarnetludisto.

Dum kelke da tagoj, mi plaĉis min per la penso, ke ŝi ekrigardas min kun pli multa ol kutime estimo, sed de tiu tempo mi estis pensanta, ke eble miaj helruĝaj haroj estas tio, kio altiris al mi ŝian atenton. Frue unu matenon, kiam la karavano estis forironta al la proksima urbeto, mi penis eltrovi en kia vagono la princino estas veturonta, sed ho ve, mi malsukcesis; ŝi estis nenie videbla. Mi duone pensis ke ŝi eksiĝis el la cirko, kaj mi ne sufiĉe kuraĝis demandi iun, ĉu tio estas fakto. Tamen, tiun posttagmezon, ŝi troviĝis ĉe la kutima loko en la malgranda tendo. Kaj dum tuta semajno mi vane serĉis survoje ŝian princinan moŝton.

Fojon, ĵus alveninte al la vilaĵo M—, ni staris ĉirkaŭ la hotela oficejo, atendante sciigon rilate al niaj ĉambroj. Baldaŭ sinjoro Ringpo venis al mi, dirante ke ne plu mi povos esti sola en dormoĉambro, kiel ĝis tiam: alia viro devos dormi en la sama ĉambro kun mi.

Tiun nokton mi enlitiĝis tuj post la fermo de la cirko, ne sciante kiu estos mia ĉambrokunulo. Baldaŭ mi dormis, kaj ankaŭ mi sonĝis.

Mi sonĝis ke mi staras en koridoro de belega domego. Dekstre troviĝis arkaforma pordego, kovrita per pezaj multekoloritaj kurtenoj. Zorge mi apartigis ilin, kaj rigardetis en la proksiman ĉambregon. Ĝi estis lukse meblita, kaj orienta incenso parfumis la aeron. Meze de mia miro, dolĉa virina voĉo alvokis ke mi eniru. Timeme mi enpaŝis la ĉambron, okule serĉante la posedantinon de l'voĉo. Sur luksa divano kuŝis la cirkasa princino. Ekvidinte mian maltrankvilecon, per la plej dolĉe maniero, ŝi petis min ke mi alproksimiĝu, aldonante ke ŝi ja

Digitized by Google

atendas min.

"Sidiĝu apud mi," diris ŝi ameme, "kaj sciigu min pri vi mem. Kial vi tie staras, tiel strange rigardante min?"

Mi penis paroli, sed mi malsukcesis. Mi estis tiel superege feliĉa, ke estis necese al mi uzi mian tutan forton, por reteni mian animon en ĝia mortema loĝejo. Sendube, ŝi aŭdis miajn korbatojn; fakta, mi ja sciis ke ŝi tion povus. Mi mem aŭdis ilin tre klare. Tiel feliĉa mi estis je mia freneza pasio, ke mi ekkaptis ŝiajn manojn, kaj kovris ilin per varmaj kisoj, ne zorgante pri la riproĉo, kiun ŝi eble poste faros al mi. Sed mia adoro ŝajnis plaĉi al ŝi, car ŝi klinis sian belan kapon al mi, kiel certa signo, ke ŝi deziras ke mi ŝin kisu. Tion mi senceremonie faris. Se tiu historia pomo ŝajnis tiel bongusta al Adamo, kiel tiu sonĝokiso al mi, laŭ mia opinio li estas pardonebla pro sia partopreno je la bedaŭrinda afero en la ĝardeno paradiza

"Pro kio vi ne parolas al mi?" demandis ŝi. "Ne timu! Ni estas solaj. Mi vin ĉi tien venigis. Parolu al mi pri vi mem. Mi ja scias ke estas io, kion vi volas diri al m; mi tion legas sur via vizaĝo."

Tiamaniere kuraĝigite, mi ekkriis, rigardante ŝian beletan vizaĝon, "Mi amas vin, ho tiel multe! Ne ridu je mi. Verdire, mi scias kiąn vidaĵon mi faras el mi mem, konsciante mian malindecon. Nenia fajro bruletis kun pli multa varmegeco ol nekonfesita amo, kaj mi ne plu povus silenti. Permesu al mi, ke mi fariĝu unu el viaj adorantoj; lasu min nur aŭdi vian voĉon,—eĉ se ĝi estus adresata al aliaj personoj,—kaj tiam mi feliĉiĝos."

Mi genufleksis ĉe ŝiaj piedoj, kaj ŝi karese manfrapetis miajn harojn. Tiam, metante ambaŭ siajn manojn sur miajn ŝultrojn, kaj altirante mian vizaĝon tre proksime al la sia, ŝi mallaŭte diris la jenajn amemajn vortojn al mi:

"Vi min amas? Mi tion jam scias. Kaj ankaŭ mi,—mi amas vin depost la momento, kiam mi vin unuafoje ekvidis. Kaj vi ludąs tiel bonege, karulo! Mi estas tiel feliĉa hodiaŭ, ke vi alvenis al mi. Neniam ni ree disiĝos. Vi ja restos tie ĉi? Mia patro estas riĉulo; li havas sufiĉe por ni ĉiuj. Ĉu vi loĝos tie ĉi kun ni, karulo? Ni ąŭskultu! Eĉ la birdoj estas pli feliĉaj, pro tiu ĉi horo nia." Kaj la dolĉa kanto de birdoj leviĝis kaj malleviĝis en la aero.

Tiam ni aŭdis piedsonojn ekstere en la koridoro. Mi eksaltis, atente rigardis la enirejon de la ĉambro,—kaj vekiĝis.

Virino estis eniranta mian ĉambron kaj ŝlosinta la pordon! La vento de apuda fenestro estingis la lampon, sed en la lunlumo mi povis klare vidi virinan figuron marŝanta trans la plankon. Neniu povas imagi miajn sentojn, kiam tuj eniris mian cerbon la ebleco ke mi ne estas en la prava ĉambro. Sinjoro Pickwick (Pikvik) iam sin trovis en simila cirkonstanco, kaj en mia tiutempa malfeliĉego, mi remoris kiel bonŝance tiu sinjoro povis fari sukcesan forkuradon. Miaflanke, mi preskaŭ ŝtoniĝis pro timego.

La situacio en kiu mi staris,—aŭ, pli precize, kuŝis,—fariĝis pli doloriga, kiam mi ekrigardis la virinon bruliganta alumeton. Tuj mi imagis en mia cerbo la timigan scenon, kiu tre baldaŭ okazos. Granda ĉielo! Kion do fari? Estis al mi certe, ke la bela, trankvila nokto fariĝos terura per virinaj kriegoj, "policanoj!" "helpu!" "mortigo!" Tiam, amaso da homoj ekpenetros mian ĉambron por savi la malfeliĉulinon. Mi estos eltirita el la lito, malĝentile puŝita tra la koridoro, elĵetita en la brakojn de la urba policano, kaj, kiam fine ĉesos la bruego, ne restos da mi sufiĉe por sendi en malgranda botelo al miaj parencoj!

Ŝajnis tuta horo, antaŭ ol la lampo eklumis. Kiam tio fine okazis, la virino sin turnis, kaj mi vidis ke ŝi estas la cirkasa princino! Ho dioj! Kian aferon ŝi faras en mia ĉambro? Aŭ, pli malbone, ĉu mi mem faris eraron,—ĉu mi estas en ŝia ĉambro? Kia ajn estas la kaŭzo de la malbonega afero, pro kio la princino ne ekkrias? Mi tie kuŝis kiel mumio, kore deziranta ke tio estus fakto. Elstaris sur mia frunto grandaj gutoj (certe ili estis sangogutoj!), kaj mi estas tute preta por eniri hospitalon. Nevole mi observadis ŝiajn movojn.

La princino ĉirkaŭen rigardis, verŝajne vidinte nek min, nek mian vestaron, kiu estis virametode disĵetita ĉirkaŭ la ĉambro. Ŝi tute ignoris mian ĉeeston, kaj mia temperaturo leviĝis dek gradojn. Demetinte sian vualon kaj eksterveston,

Digitized by Google

ŝi metis ilin sur seĝon, kie jam pendis mia jako. Diable malrapide ŝi daŭrigis siajn misterojn de senvestado, baldaŭ alvenante al tiu parto de la afero, kiam estis mia devo aŭ sveni aŭ spiregi. Mi ne havis sufiĉe da forto por spiregi, tial mi pacience atendis la perdon de konscio.

Mi estis irinta nur malgrandan distancon laŭ la vojo al nekonscio, kiam mi estis abrupte revokata al aferoj fizikaj. Ŝi alproksimiĝis al mia lito. Per voĉo kiel fagota arpeĝo en ia batalmuziko de Wagner, ŝi rompis la teruran silenton.

"Kion je infero vi rigardas?" ŝi ekkriis. "Kio estas al vi? Vi ja aspektas kiel kadavro. Jen! Prenu trinkaĵon!" Kaj, el siaj vestoj ŝi eltiris botelon, kiun ŝi donis al mi. "Prenu trinkaĵon!" ŝi ree diris. Kaj mi tutkore obeis ŝian ordonon.

Ekzamenado, helpate de sperta palato, montris al mi ke la enhavo estas viskio; kaj se iam mi englutis trinkaĵon nur por medicinaj intencoj, tiu estis la okazo. La likvoro estis je malalta fluo kiam mi redonis la botelon al ŝi, kaj ŝi baldaŭ malaperigis la restaĵon, murmurante ion pri la malbonega kvalito de kampara viskio.

Ŝi baldau fariĝis tre parolema, sed mi ne povis facile kompreni la interrilaton inter malbona viskio, blasfemaj esprimoj, kaj cirkasa princino. Kiam ŝi ankoraŭ estis en pitoreska stato de la duonvestigo, ŝi levis siajn belajn manojn al sia kapo,—kaj demetis sian abundan hararon, tre zorge metante ĝin sur la tablo. Ĝi estis peruko!

* * * * *

Neniam ree mi eniris la malgrandan tendon, sed mi ne havis tie gravan aferon. Kiam mi eníris, la princino ridetis al mi, sed neniel kiel antaŭ tiu okazplena nokto en M—.

La "princino" estis Sinjoro Himmelmann, virinpersoniganto iom fama antaŭ dudek kvar jaroj.

*El sia angla originalo tradukis*
JOHN L. STANYAN.

# Krakovo

## ĜIAJ MITOJ KAJ VIDINDAĴOJ.

(*Speciale Verkita por AMERIKA ESPERANTISTO*)

KREMDULOJ malmulte scias pri slava kulturo, malgraŭ tiel nomitaj "internaciaj" rilatoj. Oni povis aŭdi dum la Sepa Kongreso, ke "Krakovo enhavas nenion interesan,". kaj "oni ne scias, kial oni ĝin elektis kongresurbo." Ne pretendante elĉerpi la temon, mi volas nur al vi prezenti ion, el kio vi povos ekkoni, kiel falsa estas tia opinio.

Meze de Krakovo, apud bordoj de Vistulo, kies nomo signifas en sirjena lingvo riveron, staras kastelo, nomata *Wawel*. Kiel vi facile rekonas, ĝi estas identa kun la nomo *Babel,* renkontata ne nur kiel riĉa urbo de antikva Mezopotamio, sed ankaŭ en norda Eŭropo kaj ĝenerale en landoj de hinda-eŭropa loĝantaro. En mitaj tempoj vivis tie drako nomita Olofago (ĉiomanĝanto), kiun mortigis du filoj de la kastela princo, doninte al ĝi bovojn ledajn ŝtopitajn per sulfuro. Tiujn ledajn bovojn manĝis la drako, kaj sufokiĝis de fajro, kiun eksplodigis la sulfuro. Al kadavro de la drako alflugis korvoj kaj de ilia grakado estis la kastelo nomita *Krakuw*. En kaŝuba lingvo, korvo (pole *kruk*) estas nomata krak. La pli juna filo de la princo, enviante sian pli aĝan fraton, mortigis lin, sed kaŝis tiun faron, dirante ke drako formanĝis la fraton. Post la morto de la maljuna princo, kiu estis nomita Krakus aŭ Grakkus, suriris la tronon lia krima filo.

Sur *Wawel* ni povas vidi ĝis la hodiaŭa tago kavernon de Drako, kaj la tempon de la regado de Krakus oni fiksis je la jaroj 730-750. Al li oni volis atribui la unuan konstruaĵon de kastelo, kaj la nomon de urbo grupiĝinta ĉirkaŭ la kastelo. Same nomas la urbon la araba geografo el la XIa jarcento, Al-Bekri, en kies kroniko ni por la unua fojo renkontas historian citon pri Krakovo.

Drakon, korvon, oni ankaŭ trovas en aliaj mitologioj, same kiel du fratojn el

Digitized by Google

kiuj unu mortigas la alian.

Sur la Krakova Ĉefplaco staras preĝejo de Sankta Mario, havanta du turojn de malsama alteco kaj amplekso. Ili estis konstruitaj de du fratoj laŭ jena kontrakto: kiu konstruos pli altan turon, tiu edziniĝos kun fraŭlino, en kiun ambaŭ enamiĝis. La pli juna frato konstruis turon, sed baldaŭ rimarkis, ke ĝi estas malpli alta, ol la turo de lia frato. Li mortigis la fraton. La tranĉilo, kiu servis kiel mortigilo, oni pendigis por memoro en la draphalo (granda malnova konstruaĵo sur la Ĉefplaco), kie oni povas ĝin vidi ĝis la hodiaŭa tago.

Tiun historieton oni povas unuigi kun la antaŭa, kaj kun la roma legendo pri Romulus kaj Remus, kun la mito pri la ĝemeloj Kastoro kaj Polukso, el kiuj la dua estis senmorta, aŭ kun la litovaj dunaskitoj Lelum kaj Polelum, brilantaj en la ĉiela zodiako kiel konstelacio, per kiu komenciĝadis la nova jaro, 4.000 jarojn antaŭ nia epoko. Sed tio nuntempe estas supozo, kiun oni ankoraŭ devus pruvi, kolektinte pli grandan materialon.

Krakus havis filinon Wanda. Ŝi ne volis edziniĝi kun germana kavaliro Rydygier, kaj dronigis sin en Vistulo. Je ŝia memoro oni aranĝas ĝis la nuna tempo tiel nomitan "florkronfeston," fine de junio. En fiksita tago, kiam vesperiĝas, kolektiĝas apud Wawel sur ambaŭ bordoj de Vistulo dekmiloj da personoj. Tie knabinoj ĵetas sur la akvon florkronetojn, fiksitajn sur breto kun brulanta kandelo en la mezo. Tiu knabino, kies kroneto ne dronos, edziniĝos en tiu jaro. Nun tiu festo perdis sian antaŭan idolanan aspekton, kaj estas aranĝata lukse, kun artaj fajraĵoj kaj dancoj en krakovaj vilaĝaj kostumoj, sur remŝipoj.

La nomo Wanda estas mitologia, kaj troviĝas en kelta kaj irlanda lingvoj. Ĝi estas konata en Kimrujo kiel *Little van Lake*. En irlandaj mitoj Fand' signifas diinon, kies historio kuniĝis kun historio de suna heroo. Proksime de Krakovo estas "Termonteto de Wando," same kiel de Krakus. Similajn oni montras en Skandinavujo. La nomoj Venezio, Vendée enhavas saman vortradikon, troveblan en diversaj mitologioj.

Alia festo estas nomata *Konik Zwierzyniecki* ("Ĉevaleto de Zwjejunjec), kaj okazas je 28a de junio ĉiujare. Ĉirkaŭ la jaro 1281, dum regado de Leŝek la Nigra, invadis Tataroj Polujon kaj alvenis ĝis Krakovo, detruante ĉion dumvoje. En kriza momento unu flosisto kuraĝigas siajn kamaradojn, batalas kontraŭ la barbaroj kaj en triumfo revenas en la urbon kiel venkinto, ĝoje salutata de la savita loĝantaro. Por memoro oni festas tiun invadon post katolika procesio, la 28an de junio. El la antaŭurbo *Zvjejunjec* invadas Krakovon viro tatare vestita, sur ligna ĉevaleto, ĉirkaŭita de tatare vestitaj muzikantoj kaj halebardistoj kun mahometanaj duonlunoj sur la ĉapeloj. Per bastonego li batas la forkurantajn geknabojn, kaj alveninte antaŭ la episkopa palaco, li salutas ĝin per kliniĝo de standardoj kaj poste revenas al festeno, kie lin atendas abunda regalo.

Sed forlasante la krakovajn mitojn, el kiuj mi nur la ĉefajn elektis, kaj kiujn la kristanismo bedaŭrinde tiel forpelis kaj detruis, ke oni eĉ ne scias kiel malaperis la bela slava mitologio, ni vizitu la plej gravan vidindaĵon de Krakovo, la reĝan kastelon.

Sur *Wawel* staras kastelo de iamaj reĝoj de sendependa Polujo, kiun oni forstrekis el politika karto de Eŭropo, kvankam ĝia kulturo vivas kaj disvolviĝas. Kun la kastelo estas ligita la katedralo konstruita en gota stilo. Preskaŭ ĉiujn stilojn oni povas tie vidi laŭ jarcentoj de historio.

Enirante la preĝejon tra baroka portalo ni vidas flanke ripojn de mamuto, kiujn oni en mezepoko klarigadis kiel restaĵojn de antaŭdiluvaj pekuloj, kaj surpendigis antaŭ la preĝejoj por edifi kristanan popolon pri la justeco de punanto Dio.

En la preĝejo pendas ambaŭflanke tapiŝoj kiujn reĝo Johano III Sobieski, apud Vieno en jaro 1683, prenis el turkaj tendaroj post la venko. Post tiu batalo restis diversaj legendoj ĉe la popolo, ekzemple, ke Sankta Virgulino mortigis turkojn per ŝtonoj; ke ŝi ilin blindigis; kaj en kriado de kokoj la polaj vilaĝanoj aŭdis la sciigon pri alproksimiĝo de turkoj armitaj per pistoloj.

La unua el 18 ĉirkaŭantaj kapeloj en bizantia stilo, kun anĝelaro sur plafono, enhavas belegan gotan tombon, kun kapiteloj reprezentantaj bibliajn scenojn. Apude, blankmarmora kapelo kun orita

Digitized by Google

plafono, kaj marmora statuo de Kristo diranta "Venu al mi, lacigitaj, kaj mi vin refreŝigos," kopiita laŭ Thorwaldsen. Sed la plej bela estas la Sigismunda kapelo, en plej pura kaj plej bela renesanco "de tiu flanko de Karpatoj," farita de Bartolomeo Berecci. Sur muroj troviĝas subtilaj skulptaĵoj de floroj kaj fruktoj, faritaj de Cina de Sienna kaj donantaj al la kapelo aspekton de agrabla freŝeco. Tomboj el ruĝa marmoro reprezentas dormantan Sigismundon la Maljunan, kaj Sigismundon Aŭguston, reĝojn de ora jarcento de pola historio. Ekstere la kapelo estas dike orita. Sur kontraŭa flanko troviĝas la tombo de reĝino Hedvigo, el blanka marmoro, skulptita de Antoni Madejski, kaj baroka kapelo de S-ta Joahimo kun monumentoj de krakovaj episkopoj. Sekvantaj: kapelo de Johano Baptisto (XVIa jarcento), kapelo de S-ta Andreo kun renesanca tombo de reĝo Johano Olbraht. Kontraŭ tiu kapelo troviĝas monumento de reĝo Kasimiro la Granda (1330-1370), kies bela marmora baldakeno enhavas bluan plafonon kun oraj steloj.

Malsupre ĉirkaŭ la tombo troviĝas homoj en mezepokaj vestoj, plorantaj la reĝon dum kies regado komencis disvolviĝi industrio kaj komerco en Polujo.

Malantaŭ la ĉefaltaro troviĝas tri kapeloj: de episkopo Tomicki kun lia renesanca orita tombo, de reĝo Batory, malluma kun vitraĵoj de lia patrono S-ta Stefano kaj kun barokaj skulptaĵoj, kaj de S-ta Katarino. En la maldekstra navo estas granda nigra kruco kun arĝenta fono, mirinde savita dum diversaj militaj invadoj. Tie trovas sin piedingo de Kara Mustafa, el la batalo apud Vieno en 1683. En la sama navo troviĝas sarkofago de reĝo Vladyslav Lokietek (1333). Proksime de ĝi troviĝas arĝenta ĉerko kun mortrestaĵoj de S-ta Stanislavo (kiun mortigis en Krakovo reĝo Boleslavo la Kuraĝa), kun scenoj de mirakloj post lia morto.

Sub la preĝejo troviĝas katakomboj kun ĉerkoj de polaj reĝoj kaj naciaj herooj. Interalie ripozas tie la mortrestaĵoj de Tadeusz Kościusko, kies nomo estas konata al usonanoj, ĉar li estis adjutanto de Washington (1777-1786), kaj heroe batalis pro sendependeco de Usono.

Neeble estas priskribi en tia konciza artikolo ĉiujn vidindaĵojn de nia urbo. La esperantistoj partoprenontaj en la Oka Kongreso, kaj precipe la usonanoj, estos surprizitaj trovi en Krakovo multegon da antikvaĵoj, el kiuj pli ol unu estas unika en Eŭropo. Vi vidos ĉe ni ekstreme interesajn monumentojn de mezepoka arhitekturo, el kiuj kelkaj devenas eĉ el la Xa jercento, kaj tre bone konserviĝis malgraŭ la detrua influo de la tempo.

Mi ne troigas, asertante ke ĉe ĉiu paŝo, en ĉiu strato kaj strateto vi renkontos multe da antivaĵoj, indaj esti montritaj kaj klarigitaj.

Venu do grandare al la Oka Kongreso, kaj vi certe ne bedaŭros vian vojaĝon!

ANTONIO CZUBRYNSKI,
*Krakovo, Polujo.*

## A SUGGESTION.

If you found the above article interesting (as you surely did), why not help some non-esperantists to enjoy it also?

Translate it into English, and take (or send) your translation to the editor of your local paper or some other publication in which you have especial interest. Preface it with an introduction something like this:

An article on the capital city of Ancient Poland, written especially for the American magazine AMERIKA ESPERANTISTO by a resident of that city, Mr. Antonio Czubrynski, has seemed to me so interesting that I made an English translation of it which I submit herewith, so that if you can give it space your readers may have an opportunity to enjoy it, even though they can not all read it in the original Esperanto. This interesting city, comparatively little known to American tourists, is of especial interest now, because next August the big Eighth Esperanto Congress will take place there. A number of Americans are planning to attend, visiting many of the chief cities of Europe en route, but even for those of us who can not go on this trip there is pleasure to be had from reading articles about the places to be visited, and above all the "Congress City" itself, such as I offer herewith.

Digitized by Google

# *La Unua Ĝustatempa Manĝo*

DE ZONA GALE.

PENSU kiel strange ŝajnis ĉio, antaŭ ol monatoj, semajnoj, tagoj, horoj, minutoj kaj sekundoj estis kalkulitaj! Ekzemple, se la pratempuloj volis ekscii kiam okazis io, kompreneble ili ne posedis la vorton "kiam," nek respondon. Neniu sciis kiom da tempo oni devus boligi ovon, aŭ baki panon. Por matenmanĝa horo, ili devis simple sidiĝi kaj atendi ĝis kiam la nutraĵo estos preta. Plej bedaŭrinde el ĉio ĉi, la pratempuloj eĉ ne sciis ke oni ne devus malŝpari la tempon! Pro tio, ke ili ne povis ĝin mezuri, kompreneble ili ne rimarkis kiel rapide ĝi preterpasas; kaj eble ili opiniis ke ili rajtas ĝin uzi tiel, kiel plaĉas al ili, anstataŭ difini diversajn partojn por diversaj celoj,—unu parton por dormado, alian por laborado, la ceterajn por ekzercado, amuzado, k. t. p. Neniu sciis pri naskotagoj, kaj neniu povis komenci rakonton per la vortoj "En antikva tempo." Vere, ĉio estis mirige miksata!

Nu, ĉirkaŭ tiam (sed, kompreneble, ili ne sciis pri "tiam") pratempa patrino unu matenon diris al sia pratempa filineto: "Nun, filino, praktiku, kaj poste vi rajtos vin amuzi."

Nek je fortepiano praktikis la filino, nek je orgeno. Ŝia muzikilo estis bela tubsimila trablovilo, simila al' paŝtista fluto; kaj ĉiam post matenmanĝo la pratempaj knabinetoj sidiĝis sur rokoj en la pejzaĝo kaj praktikis.

Ĉi tiu knabineto prenis siajn flutojn kaj, sidiĝinte sur roko, ŝi praktikis tiom da tempo, kiom laŭ nia nuna scio (sed ŝi ne sciis) estas kvin minutoj. Tiam ŝi envenis en la kavernon kaj ĵetis siajn flutojn sur la liton el feloj, rememoris ke tio estas malprava, kaj ilin pendigis ĉe ilia propra loko, super la fajrujo. Ŝi tiam sin turnis por eliri el la kaverno, sed la patrino, kuirante viandon antaŭ la fajro, revokis la filinon.

"Filino mia," ŝi diris, "ĉu vi forgesas ke vi devas praktiki?"

"Mi ja praktikis," respondis la knabino.

"Sed praktiku, kaj praktiku!" diris la patrino, ne sciante kiel klarigi ke la infano devus praktiki tutan horon. La patrino ne konis horojn, tamen ŝi sciis per siaj sentoj kiam la filino sufiĉe longe praktikis.

Denove la knabino eksidis sur roko, kaj denove ŝi praktikis,—proksimume kvin minutojn. Tiam ŝi ree envenis la kavernon, ĵetis siajn flutojn sur la liton el feloj, rememoris, prave ilin pendigis, kaj ree estis eliranta el la kaverno. Duan fojon la patrino ŝin revokis:

"Filino mia," diris la patrino, "ĉu vi deziras ke ree via patrino estu devigata vin atentigi?"

"Vere, ne, patrino," respondis la knabino.

"Do, praktiku, kaj praktiku kaj praktiku!" diris la patrino. "Se vi altkreskos, ne lerninte kiel muziki, kion oni pensos?"

Ree la infanino iris al sia pentrinda roko. Tio okazis ree kaj ree, ĝis kiam ŝi estis praktikinta tiom da tempo, kiom laŭ nia nuna kalkulo estas tuta horo.

Kompreneble tiu ĉi konstanta ripetado, kune kun la ordigado de la kaverno, kaj la kuirado, estis premanta laborado. Tial la pratempa patrino decidis ke ŝi konsiliĝos kun sia edzo.

Kiam la suno staris super la ĉielo, kaj ekzistis neniom da ombraĵo, kaj kiam la bruna kaj bonodora viando estis kuirita kaj duonkovrita de aromaj herboj, la virino eltiris el la cindroj la legomojn, kaŝis la deserton (ĝi estis "surprizo"), preparis antaŭ la kaverno ebenan rokon anstataŭ tablo, kaj ornamis sian kapon per folioj. Tiam ŝi kaj la knabino sidiĝis por atendi ĝis kiam venos la edzo kaj patro.

Forpasis la momento, kiun ni nun nomas tagmezo. Forpasis horo kaj alia, tiam ankoraŭ pli multaj horoj. Forpasis la posttagmezo kaj frua krepusko, sed ankoraŭ ne venis la viro. La knabino ploris pro malsato; glacie malvarmaj fariĝis la viando kaj legomoj; kaj sen rideto, atente rigardante en spacon, sidadis la pratempa edzino kaj patrino.

Ĝuste kiam la luno pendis super la

Digitized by Google

mola brusto de la malproksima arbareto, venis la viro, trankvila kvazaŭ nenio estis malprave okazinta.

"Ĉu la tagmanĝo estas preta?" li afable demandis.

Tio estis *la lasta pajlo sur la kamelo,* kaj tion ŝi diris al li, starante ĉe la enirejo de la kaverno, dum la filino ploris. Tiam ŝi malgaje diris, "Edzo mia, la tagmanĝo estis pretigita, kaj pretigita, kaj pretigita, kaj pretigita!" Tion dirante ŝi montris al li la malvarmajn legomojn kaj viandon.

"Mi tre bedaŭras. Mi ne sciis," penteme respondis la viro. Li faris ĉion, kion li povis, por atesti sian bedaŭron. Rapide malferminte la ĉasaĵujon li eltiris la ĉasaĵon kaj ĝin montris al sia edzino. Ankaŭ li donis al ŝi molan pelton por fari kufon, kaj etan !agopan bruston por ĝin garni. Fine ŝi diris (ĉar neniu povas resti ofendata se pentema estas la ofendanto): "Nu, ne diru plu, ni tranĉos la viandon, ĝi estas tre bona; kaj mi revarmigos la terpomojn kun bruna butero. Sed forrapidu kaj vin banu, alie mi ree estos preta pli frue ol vi."

Forrapidinte, la viro sin banis en rivereto; la kaverno fariĝis bonodora pro la bruna butero; la knabino ornamis sian kapon per flugilo, kaj la tri homoj eksidis ĉe vespermanĝo. Estis proksime al la oka horo, sed tion ili ne sciis.

Post kiam ili estis manĝintaj la plej gravan parton de la manĝo, kaj la deserton, la "surprizon," kaj ili ja estis surprizitaj,—la virino, tre rekte sidante kaj ne ridetante, diris: "Nun, ion ni devas fari."

"Pri kio?" demandis la edzo.

"La filino ne sufiĉe praktikis, kaj vi ne sufiĉe frue venis al tagmanĝo," ŝi respondis, "kaj ion ni devas fari."

"Mi ja praktikis,—unu fojon," diris la knabino.

"Sed," respondis la patrino, "vi devus praktiki unu fojon, kaj unu fojon, kaj unu fojon, kaj unu fojon, kaj tiel plu, sen neceso ke mi atentigu vin pri ĉiu fojo."

"Mi ja venis al tagmanĝo," diris la oratempa edzo, almontrante al la malplenaj teleroj.

"Sed," respondis la edzino," vi devus veni unue, kaj unue, kaj unue, kaj unue, kaj tiel plu, kaj ne okazigi ke la tagmanĝo fariĝu malvarmega."

"Aŭskultu ion," ŝi aldiris, metante iom da salo sur la roktablon. Tiam per la bastono sur kiu la viando estis rostita ŝi desegnis cirklon en la salo. "Tiu," ŝi diris, "estas la ĉielo; tiu ĉi supre estas la supro de la ĉielo; kaj kiam la suno estis super la ĉielo, kaj neniom da ombraĵo plu aperis, tiam la tagmanĝo estis preta, varma kaj bona. Ankaŭ mi havis deserton, por surprizo. Kaj tial, kiam ajn la suno estas super la ĉielo, kaj ombraĵo ne plu ekzistas, venu, *ĉiam,* por manĝi! Tio estos tagmanĝo."

"Bone," respondis la viro.

"Tiam la virino faris signon en la rando de la sala cirklo. "Kiam la suno pendas ruĝe ĉe la rando de la ĉielo," ŝi diris, "kaj la ombraĵo fariĝas longa, kaj mallumo alproksimiĝas, tiam pretaj estos nuksoj kaj beroj kaj verdaj kreskaĵoj, kaj sukeraĵoj kaj aliaj manĝaĵoj por vi. Kaj kiam ajn la suno pendas ruĝe ĉe la rando de la ĉielo, kaj la ombraĵo fariĝas longa, kaj mallumo alproksimiĝas, tiam venu, *ĉiam,* por manĝi! Tio estos vespermanĝo."

"Bone," denove respondis la viro.

Tiam ŝi faris per la bastono longan strekon laŭ la rando de la cirklo. "Tio ĉi estas dormado," ŝi daŭrigis. "Tio estas vekiĝo, kaj manĝado de matenmanĝo. Baldaŭ ree la suno estos super la ĉielo ,kaj mi havos tagmanĝon preta, same kiel antaŭe. Kaj tia aranĝo taŭgos por vi. Sed kion mi faros por la filineto mi ne scias,—escepte se mi ordonos al ŝi ke ŝi praktiku de kiam la suno pendas super la ĉielo ĝis kiam ĝi malsupren iros,—ĉar se ŝi altkreskos ne lerninte muziki, kion oni pensos?"

Dum la virino parolis, ŝi starigis la bastonon rekte ĉe la mezo de la sala cirklo. Tial ke la luno pendis alta kaj blanka, la viro ekvidis ke la ombro de la bastono kuŝis sur la cirklo de ĝia mezo trans la rando. Subite li ekprenis la bastonon kaj ĝin sammaniere tenis. Kaj tie li sidis senmove, kaj longe pensadis.

"Patro," diris la knabineto, "ĉu vi donos al mi pafarketon kaj sagon, kaj skrapos ilin kaj faros ilin blankaj?"

Sed la patro ne aŭdis ŝin. Anstataŭ respondi li eksaltis kaj desegnis profunde strekitan cirklon en la mola tero antaŭ la kaverno. Tiam li forkuris por serĉi la longan bastonon, kiu subtenis sur lia ŝultro la ĉasaĵon. Tiun bastonon li en-

Digitized by Google

puŝis teren, meze de la cirklo.

"Ekrigardu tion!" li tuj ekkriis.

Malmulte komprenante, tamen plene konfidante, la filino kaj la patrino sidiĝis apud li; kaj tie per la lunbrilo ili kune rigardadis la ombrajon, dum ĝi vojaĝis laŭ la rando de la kvazaŭa ciferplato. Simile al fingro ĝi moviĝis, kaj ili ĝin observadis dum ĝi iris laŭ la cirklo. Tiam diris la patrino al la filino, "Vere, vi estas dormema,—ĉu vi ne mem scias tion?" Kaj ŝi kondukis la filinon al lito, dum la knabineto protestis ke ŝi tute ne estas dormema, sed kontraŭe sentas sin tre maldormema, same kiel dum la tago.

Kiam la virino revenis el la kaverno, la viro ŝin rigardis per okuloj plenaj je miro. "Edzino mia," li diris, "se la suna ombro agas same kiel la ombro de la luno, je tio ni povos sufiĉe praktikigi nian filinon."

La sekvintan matenon, kiam la knabino elvenis el la kaverno, ŝi vidis la gepatrojn genufleksantaj antaŭ la cirklo. Ili observis la longan sunombron faratan de la bastono. Diris la patrino:

"Nun, filino mia, ni matenmanĝos. Tiam alportu viajn flutojn kaj tie ĉi vi praktikos. Je la komenco mi metos pecon da osto tie, kie estas la ombro, kaj kiam mi sentas ke vi sufiĉe praktikis, mi metos alian pecon da osto ĉe la tiama ombro. Kaj ĉiam poste vi praktikos ĉiutage de unu osto ĝis la alia."

Apenaŭ la knabino povis atendi por manĝi la matenmanĝon, tiom ŝi deziris praktiki laŭ la nova metodo. La patro ne foriris por ĉasi, la patrino ne sin okupis je hejmaj devoj; sed ĉe la cirklo ili sidiĝis, kune kun la filino. Aŭskultante la muzikon, kaj rigardante la ombrofingron dum ĝi moviĝis, ili atendis ĝis kiam la patrino sentis la senton de sufiĉo.

Nu, de kiam komenciĝis la mondo, pendadis en aero horoj, minutoj, kaj sekundoj, kaj pacience ili atendis ĝis kiam homoj povos kompreni pri ili. Sed neniu pensis pri ili, kaj sendube la knabino, la patrino kaj la patro estis la unuaj personoj, kiuj iam havis ideon pri ili. Tial, je la sekundo kiam la filino komencis ludi sian fluton, kaj oni metis oston ĉe la cirklo, tiu sekundo (en la aero, tamen tiel proksima al ili, kiel la tempo estas al ni) eksciis ke fine ĝi estas markita. Kaj ankaŭ eksciis la sekundo plej proksima al tiu, kaj alia, kaj alia, kaj ankoraŭ alia, ĝis kiam eksciis sesdek. Tiam la unua minuto estis mezurita de la cirklo antaŭ la kaverno. Aliaj minutoj sciiĝis pri tio, kio okazis; ĉiuj venis rapide, kaj la aero pleniĝis je ĉarmaj, nevideblaj estaĵoj, kiuj alvenis dum dolĉe la knabino ludis, kaj la bela tubosimila trablovilo faris allogan muzikon. La unuan fojon en sia mallonga vivo la knabino sentis ke praktiki estas ne nur praktikado, sed efektive farado de muziko; tie, dum ŝi rigardadis la strangan tempodirantan ombron.

"Ĝojo!" ekkriis la sekundoj, "homoj komencas nin atenti,—ne tro frue, laŭ nia opinio. Pensu pri niaj gefratoj, kiuj venis antaŭ ol iu ajn sciis pri ili!"

Ankaŭ la minutoj interparolis unu al la alia. Kiu scias ĉu efektive la tempo estas tiel silenta, kiel ni imagas? Eble en la koro de la tempo okazas delikataj interparoladoj pri kiuj ni scias nenion,—de sekundo parolanta al sekundo, de minuto respondanta al minuto, dum la gravmienaj horoj aŭskultas al ĉio, kion ni diras, kaj vidas kion ni ne faras, kaj kune kun la tagoj pridiskutas nin, kaj la eternon el kie ili alvenas! Mi ne scias kiel ili parolas pri vi,—tion vi scias, se vi povas pensi; kaj precipe se vi staros proksime de granda horloĝo, aŭ nokte aŭskultos la horloĝajn batojn. Same mi ne povas diri kiel ili parolas pri la eterno.

Kiam kun kantado kaj dancado forpasis sesdek minutoj, jen alvenis la unua rozkolora horo, kies alveno kaj foriro estis markitaj. Kiam tiu horo estis pasinta, la patrino sentis la senton de sufiĉo, kaj diris:

"Tio sufiĉas, filino mia, nun vi rajtos vin amuzi!"

Jen la unua fojo, kiam iu ajn knabineto praktikis precize horon laŭ ia tempomarkilo.

"Edzino mia," diris la pratempa viro, "mi havas aliajn pensojn. Ni ja povos ankoraŭ alie uzi la cirklon."

"Kiaj aliaj uzoj ekzistas, krom via venigado hejmen, kaj praktikigado de la filineto?" demandis la pratempa patrino kaj edzino.

"Ni povos meti malgrandajn ostojn inter la aliaj," diris la viro. Per tio li kompreneble intencis la mezuradon de minutoj. "Per unuj vi povos rosti viandon, ne devigate tiel ofte surgenuiĝi por rigardi; per aliaj vi povos boligi ovojn,

Digitized by Google

fari kukojn, kaj eviti la danĝeron de brulado al la faboj. Ankaŭ—"

Momente li silentis, kaj alrigardis la arbareton, super kiu brilis la suno kiel eble plej hele, ĉar ĝi havis laŭdindan motivon. Tiam malrapide parolis la viro:

"Dum mi alrigardis tiun moviĝantan ombrofingron, ŝajnis ke tiu, kiu aju faris la sunon, parolis al mi, kvankam sen vortoj. Ĉar la suno moviĝas, kaj kun ĝi la ombro,—kvazaŭ por diri al ni kiom da tempo daŭrigi tiun ĉi aŭ tiun aferon, kaj utiligi la tempospacon inter la ostoj, —tiu, kiu ajn faris la sunon, diras tion al ni, kvankam sen vortoj!"

Kun admiro la pratempa virino rigardis la edzon. "Vi estas mirinda," ŝi ekkriis.

Tiam li foriris por ĉasi, kaj la unuan fojon en lia pratempa vivo ŝajnis al li kvazaŭ ie en la aero ekzistas granda kaŭzo, pro kiu li devus fari grandajn aferojn. Kaj la virino kuiris en la kaverno, kaj prave ordigis ĉion, ofte kurante al la enirejo de la kaverno por rigardi la cirklon, kvazaŭ ĝi alportis al ŝi parolsendaĵon, ke ŝi devus rapidi,—parolsendaĵon sen vortoj. Kiel koncernas la knabinon, ŝi prenis siajn flutojn kaj fordancis tien, kie sur rokoj en la pejzaĝo sidis ankoraŭ aliaj pratempaj knabinoj, praktikantaj. Al ili ŝi penis rakonti pri la cirklo. Desegninte cirklon, ŝi ĉirkaŭensaltis, flirtigis la flutojn, kaj penis per fluta muziko komprenigi al la kunulinoj. Iom ili ekkomprenis, same kiel oni ekkomprenas novan ludon; kaj tiam ili ĉiuj samtempe ludis siajn flutojn, dise sidante en la verda kampo. Al la sono de la muziko gaje venis aro da sekundoj, minutoj kaj horoj, kiuj nun estis mezurotaj.

Kiam la suno pendis ĉe ĉielsupro, la knabino rememoris, kaj enpuŝis bastonon en la teron. Ĉar ŝi vidis tre malmulte da ombraĵo, ŝi forlasis la aliajn infanojn, kaj rapide kuris al la kaverno. Kiam ŝi preskaŭ alvenis, ŝin atingis viro, kiu ankaŭ rapide kuris samdirekten.

"Patro!" ŝi ekkriis, kaj la patro ŝin levis al sia ŝultro eĉ dum li daŭrigis kuri. Al la enirejo de la kaverno ili alvenis ĝuste kiam la bastona ombro almontris rekte al la supro de la cirklo. Tie sur la ebena roktablo antaŭ la kaverno kuŝis varmega viando, bongustaj legomoj,—kaj nebrulintaj faboj. Kaj la pratempa virino, kun kapo bele ornamita de folioj, staris rigardante rekte antaŭ si, dolĉe ridetante. Jen estis la unua manĝo en la tuta mondo, kiu iam ajn estis ĝustatempe metita sur la tablo! Kaj de tiu tempo ĝis nun, veni malfrue al manĝoj estas tre malkonvene. Eble por rememorigi tiun pratempan sinjorinon nuntempe la plej afabla sinjorino povas rekte rigardadi en spacon, sen rideto, kiam personoj alvenas malfrue.

"Ĉu tagmanĝo estas preta?" demandis la viro.

Kaj afable respondis la virino, "Je la osto!"

"Kio estos la deserto?" demandis la knabino.

"Ĝi estos surprizo," respondis la patrino,—kaj efektive tio estas la deca respondo al tia demando.

Kaj dum ili tie sidadis, rapide venis al ili la tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj, por esti mezurataj per la cirklo, antaŭ la kaverno, kaj por esti uzataj. Ankoraŭ nun ili alportas benadon similan al parolsendaĵo, kvankam sen vortoj.

*El la angla tradukis,*
*laŭ afabla permeso de la aŭtorino,*
L. de L. Helliwell.

---

## LA PROVO DE L' KORO.

DE ELLA WHEELER WILCOX

Afableco ja venas facile,
  Dum la vivo similas al floro;
Sed rideti dum ĉio okazas malbone,—
  Jen la provo de homa valoro.
Ĉar jen estas vera provilo:
  Malfeliĉo, premega en koro;
Kaj jen la juvel' plej valora de l' mond':
  La ridet', kiu brilas tra ploro.

*El la angla tradukis*
Farnsworth Wright.

## PENSO DE VILHELMO PENN.

Ĉu estas iel grave, se mi diferencas de homoj per religiaj opinioj? Ĉu mi estas do kontraŭema al homa socio? Mi konas neniujn homojn, kiuj ne taŭgas por politika socio, escepte de tiuj, kiuj havas principojn renversantajn je industrio, fideleco, justeco kaj obeemo. Kvin ecoj estas necesaj por bona oficisto: kapableco, puraj manoj, rapideco, pacienco kaj senpartieco.

*El la angla tradukis*
Wyatt Rushton.

Digitized by Google

# Praha

AMERIKANOJ ofte venadas en centran Eŭropon, en la antikvan aŭstrian regnon Bohemujon, kiu kun la najbaraj landoj Moravio kaj Silezio estas historia patrujo de la sepmiliona (kun hungaraj slovakoj dekmiliona) slava popolo bohema aŭ ĉeĥa, kiu havas ankaŭ centmilojn da anoj en Ameriko. Bedaŭrinde, amerikanoj vizitas en Bohemujo preskaŭ nur la luksajn kaj ĉarmajn banurbojn Karlsbad kaj Marienbad, en landlima germana teritorio, kaj ne ankaŭ aliajn regionojn, en kiuj estas tamen multaj naturaj belecoj, kaj, krom tio, multe da antikvajoj.

Precipe la ĉefurbo Praha, la "ora, slava Praha," la "centtura Praha," meritas viziton de fremdulo, sed kompare kun aliaj eŭropaj urbegoj malofte ĝin ricevas, kvankam ĝi estas multe pli interesa ol multaj el ili. Mi deziras atentigi je Praha, kaj jen, pro tio mi skribas tiun ĉi artikoleton.

Tre malmulte da urboj havas situacion tiel ĉarman, kiel tiu ĉi bohema ĉefurbo: en valo de larĝa blua rivero *Vltava*, en kiu brilas smeraldaj insuloj; kaj inter verdaj montetoj, el kiuj unu norda portas la majestan kastelon de bohemaj reĝoj. Ĉie de la montetoj oni vidas panoramon de la ĉefurbo, kiu tiel plaĉegas. "Perlo en diademo de urbo" eknomigis Praha'n Goethe, kaj la glora vojaĝinto Aleksandro von Humboldt pri ĝi diris ke ĝi estas laŭ lia opinio la kvara urbo de l' mondo koncerne belecon (Neapolo, konstantinopolo, Salzburg kaj Praha).

